

la verda stelo

**ESPERANTO
NEDERLAND**



**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

aprilo 2008



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO
GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72

retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. +3150 525 00 86

retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan jaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo
Harm Roeters
retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

3 ... Klubkunvenoj, naskiĝtagoj

4 ... Kasisto sciigas...

5 ... Pri la nordo

10 ... Pasko en Pollando

13 ... Pola Radio

14 ... Letero el Bulgarujo

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2008

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op Postbanknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00

Klubkunvenoj

aprilo

- 17 gastpreleganto: *Mramba SIMBA*
pri helpprojektoj al la komunumo de lia vilaĝaro en Tanzanio

majo

- 1 ne okazos!
15 pri Ubuntu – *Johan Swenker*
29 kune manĝi

septembro

- 4 ferioj
18 gastpreleganto *Rob MOERBEEK*

oktobro

- 2 malferma vespero
16 prelegos *Harm ROETERS*
30 ekzamenekzercoj

novembro

- 13 gastpreleganto *Ginta LIATUKAITE*
27 librorecenzoj

decembro

- 11 festvespero

- someraj renkontiĝoj -

julio

- 3 teraso V&D, Grote Markt

aŭgusto

- 7 Schimmelpenninckhuis

ambaŭ je la 10-a horo

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia retejo
sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

majo

- 5 G. Kruijer
7 G.C. Boer
11 J. Hennekam-Tijs, J. van der Laan
23 Frans Schild

julio

- 9 D. Langers



junio

- 1 A.M. Oosterwijk-Dominicus
8 H. van Dalen
16 Harm Roeters
24 Wim Rijnders, J. Snoek

aŭgusto

- 10 Nelly Kiel-Klunder
16 Koos Scharroo
27 H. Bron
30 Johan Swenker

Naskiĝtagoj

Kasisto sciigas

Een goed verstaander heeft maar een half woord nodig

Het is min of meer een 'goede gewoonte' om de leden en abonnees vroeg in het nieuwe verenigingsjaar te verzoeken de verschuldigde 'kotizo' of 'abonkotizo' te betalen. Maar omdat zo'n verzoek in La Verda Stelo niet altijd het gewenste resultaat oplevert, heb ik besloten deze keer maar van zo'n aansporing af te zien.

Dat betekent natuurlijk niet, dat het lidmaatschap of abonnement in 2008 gratis is, maar dat had u waarschijnlijk zelf ook al in de gaten.

Om het u gemakkelijk te maken, staat voorin in elke 'informilo' een overzicht van de contributie van Esperanto Noord-Nederland.

Ik zou zeggen: 'doe er uw voordeel mee'.

Luit Staghower, penningmeester

Saĝa kapo duonvorton komprenas

Ĉiun jaron la membroj kaj abonantoj povas legi peton pagi la kotizon aŭ abonkoti-
zon. Sed ĉar tia peto plejofte ne havas la deziratan rezulton, mi decidis, ke ĉi-jare
ĝi ne aperu en nia informilo. Mi opinias, ke ankaŭ sen tia peto ĉiu membro kaj
abonanto konscias, ke la kotizo aŭ abonkotizo pagendas.

Se vi estas inter tiuj membroj aŭ abonantoj, kiuj ne jam transkontigis la ŝulditan
sumon, bonvolu ne maltrankviliĝi. Sur paĝo 2 de ĉiu informilo estas skribite kiom
pagi kaj al kiu konto sendi la monon.

'Por saĝulo sufiĉas aludo'.

Luit Staghower, kasisto

☆ SPJA ☆



Pri la nordo

29 novembro 2007

LA TEMO ne estis gramatiko. Ni tamen pritraktis kelkajn gramatikaĵojn. Kiam diri partoprenanto kaj kiam partopreninto? Unue translokiĝu, aŭ pli bone transtempigu, al la tempo de la frazo. Nur tiam esploru ĉu la partoprenado jam finiĝis aŭ ne.

En leciono 7 de la reta kurso la temo estas la direkta *n*. Ĉe la prepozicioj *sur* kaj *al* tio estas simpla kaj tuj rekonebla, sed kio pri la prepozicioj *tra* kaj *laŭ*? Tiam oni ne uzu la direktan *n*, sed kial?

La temo estis *falsaj amikoj*. Antaŭ 12 jaroj ni havis la saman temon. Tiam Johan verkis: Kelkaj amikoj devus esti tre konataj: *kandelo* – *kaars*; *kandelaar* – *kandelingo*.

Aliaj estis konataj, sed forgesitaj: *familio* – *gezin*, *familie* – *parencaro*; kaj aliaj mi tute ne konis: *dilo* – *dikke plank*, *dille* – *aneto*. En la pasintaj 12 jaroj mi neniam uzis la vorton *parencaro*, mi do forgesis, same kiel multajn aliajn vortojn. Ĉu de nun mi forgesos ilin denove?

13 decembro 2008

EN LA DREESFLAT ni festis Zamenhoftagon. Jam antaŭ la sepa ĉeestis multaj homoj. Ili preparis la tablon kiel memservan bufedon. Fakte la tablo estis iom tro malgranda: post disdonado de dolĉa kuko, la reston ni metis sur seĝon. La tablo ne estis sufiĉe granda, ĉar ĉeestis multaj homoj kaj ĉiu kunportis ion por manĝi aŭ trinki. Koos ludis akordionon, kaj post la manĝo, kiam kelkaj personoj lavis la manĝilaron, dum aliaj atendis ludante Domiling-on, ankaŭ Gonda ludis la akordionon, ŝi ja kunportis ĝin. Domiling' estas konata domenludo, sed sur la brikoj troviĝas vortoj kaj bildoj. La celo estas ligi

vortojn al la koncernaj bildoj. Estis agrabla kaj bongusta vespero. (Johan).

10 januaro 2008

ĈIUJ ĈEESTANTOJ partoprenos la venontan Universalan Kongreson en Rotterdam, de kiu ni pritraktis la liston de plenumotaj taskoj.

Wil voĉlegis pri nia jubilea ŝipekskurso en Frislando la raporton, kiun verkis Anne kaj Andreas de Esperanto-grupo *Unterweser*. Ŝi ricevis retmesaĝon de sinjorino, kiu demandis ŝin, ĉu estos Esperanto-kurso en la ĉirkaŭaĵo de Leeuwarden. La saman demandon ricevis ankaŭ Ineke.

Iu sinjoro el Winschoten telefonis al Wil kaj demandis, ĉu ŝi sendis peton por nomigi straton en Winschoten *Esperantostraat* aŭ *Zamenhofstraat*. Li verŝajne celas la peton, kiun sendis Joke Hoobroeckx nome de Esperanto Nederland. Ŝi sendis tiun peton al ĉiuj nederlandaj komunumoj. En la sudnederlanda Voerendaal nun estas pro tiu kampanjo *Esperantoplein*.

Wil aŭdigis la nederlandlingvan tekston, kiun sendis al ŝi juna studento pri ĵurnalismo, kiu antaŭ nelonge ŝin intervjuis.

Koos sendis ekzempleron de La Verda Stelo, en kiu estas raportoj pri la Komoraj Insuloj kaj Tajvano, al Pola Radio. Eble ili pritraktos ĝin en la rubriko *Esperantogazetaro*.

Harm Roeters membriĝis al UEA kaj ricevis ekzempleron de revuo *Esperanto* unuafoje. Li solvis la krucenigmon kaj tiel partoprenas la krucenigman konkurson. Oni jam sciigis al li, ke lia solvo estas ĝusta.

Luit raportis pri la plej freŝdataj travivaĵoj de sia korespondamiko Joseph, kiu studas nuntempe en *Bydgoszcz* (Pollando). De la 22-a de decembro ĝis la 7-a de janu-

aro Joseph intencis viziti parencojn en *Charleroi* (Belgujo) kaj poste la hejmon de Luit. De la 21-a de decembro 2007 ankaŭ Pollando apartenas al tiel nomataj *Schengen*-landoj. Ties civitanoj ne bezonas plu vizon por veturi tra alia Schengen-lando, sed ĉu tio validas ankaŭ por tiuj, ekz. Joseph, kiuj havas studentan vizon por unu el tiaj landoj? Mi dubas pro tio, kio poste okazis. La aŭtobuson, en kiu Joseph veturis, oni haltigis je la pol-germana landlimo kaj ne permesis al li transiri la limon. Anstataŭ tio, oni kondukis lin al apudlandlima arestejo kaj verŝajne li devos resti tie minimume tridek tagojn. Ne estas klare, kio okazos poste. Sendis leteron kaj Luit kaj la estro de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo al la regiona juĝejo por konfirmi la planojn de Joseph: dusemajnaj ferioj kaj poste reveturo al Pollando. Luit ne nur sendis retmesaĝon al la pola ambasadejo en Hago, esperante, ke oni pretos helpi lian korespondamikon, sed ankaŭ telefone klopodis ekspliki la situacion de Joseph al kelkaj deĵorantoj en la arestejo, kio ne sukcesis pro lingvoproblemoj. Li ne jam ricevis respondon.

Luit disdonis kelkajn ekzemplerojn de *Mikrofone*. Okaze de kristnasko kaj la nova jaro sendis ilin al li la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio. Oni sendis ankaŭ tri kompaktnaj diskojn kun tradicia ĉina muziko.

Wil voĉlegis poemon, kiun la klubo de Nijmegen sendis kiel bondeziron pro la nova jaro.

La temo de la vespero estas *vivanta gazeto*. Johan kunportis artikolon pri kunveno en Germanujo de fientrudigantoj en fremdajn komputilojn (t.n. *hackers*). Kelkaj el ili sukcesis rompi la sekretan kodon de la nederlanda publika trafikarto. Pri tiu 'sukceso' aperis artikolo en nederlanda

ĵurnalo kaj ankaŭ per televido oni raportis pri tio.

Alia novaĵo, kiun Johan pritraktis, estis la bankroto de la televida entrepreno *Tell Sell*.

Luit kunportis plurajn artikolojn:

- la nova staturo de *Frans Bauer* plaĉis nek al liaj fanoj nek al Frans mem. Pro tio la populara kantisto denove iomete dikiĝis.
- sur la afrika insullando *Madagaskaro* 18 personoj mortis pro la pesto. En Mezepoko milionoj da homoj en Eŭropo mortis pro tiu grava malsano, kiun oni sukcese kontraŭbatalis, sed precipe en Afriko dekoj da homoj tamen mortas pro la pesto ankoraŭ ĉiun jaron.

- dise en Nederlando okaze de la nova jaro banis sin en la malvarma akvo centoj da homoj. En *Kantens* dudeko da 'ŝatan-toj' partoprenis la novjaran plonĝadon en la kanalon *Boterdiep*. Poste ili povis revarmigi sin en granda kuvo kun varma akvo aŭ eĉ en movebla saŭno starigita apud la muelejo.

- en Nederlando famas la arbo de *Anne Frank*, sed en Turkujo la arbo de *Atatürk* estas same fama. Dum ŝipveturado en 1929 la maljuna platano altiris la atenton de la fondinto de respubliko Turkujo. Li decidis konstruigi apud la arbo domon, kiu estis finkonstruita en malpli ol unu monato. Unu jaron poste la ĝardenistoj de Atatürk diris al li, ke ili devos pritondi branĉon de la platano, ĉar alie la branĉo difektos la tegmenton de la domo. Atatürk rifuzis dirante: "*La arbo ĉi tie staras pli longe ol la domo, ni do translokos la domon.*" La domo estis translokita 4 metrojn kaj 80 centimetrojn. (Luit)

24 januaro 2008

NI KUNVENIS sesope. Estis la plej silenta kunveno, kiun mi iam ĉeestis. Kial? Ĉar ni spektis la tutan filmon *Gerda Malaperis*, krimromaneton, kiun verkis *Claude*

Piron.

Li forpasis la 22-an de januaro, ni do memoris lin. Estis tre hazarde, ke la spektaklon de tiu filmo ni planis ĝuste ĉi tiun vesperon.

Post iom da konversacio pri *EDE*, kio estas *Eŭropo-Demokratio-Esperanto*, politika partio, Luit sciigis la lastan novaĵon pri Joseph, kiu havas malfacilaĵojn en Pollando pro netaŭga vizo aŭ pasporto. (Wil)



Claude Piron

6 februaro 2008

LA TEMO de la vespero estas *poemoj*, sed unue ni aŭdis kelkajn malĝojigajn rakontojn: Joseph, la afrika amiko de Luit, restadas ekster Bjalistok, kie li en 2007 komencis sian studadon pri turismo. Kiam li mem deziris turistumi, problemoj ekestis ĉe la limo inter Pollando kaj Germanujo. Luit voĉlegis lian lastan leteron en kiu li sciigas, ke li troviĝas en domo por rifuĝintoj kaj ne certas pri la estonteco.

Ankaŭ Koos ne gajigis nin. Antaŭ kelkaj semajnoj li legis ie mesaĝon, ke fama esperantisto el Belgujo estas en malliberejo kaj suspektata pri seksatenco eble okazinta antaŭ multaj jaroj. Montriĝis, ke temas pri *Petro De Smedt*. El la malliberejo li sendis leterojn al *Paul Peeraerts*, kiu publikigis ilin. Ni ĉiuj estis tre afliktitaj pro liaj leteroj. Akuzis lin virino kun multaj

psikaj problemoj. Petro estas provizore libera nun, kaj ankaŭ li ne scias pri la estonteco. Du personoj el diversaj landoj en malagrabra situacio.

Poste ni pritraktis kelkajn poemojn, inter ili *La Tagoj Pasis, Malsana Roboto, Kvereloj, Miskompreno* (R. Schwartz), kaj *Maljuneco fare de A. Schouten*. (Ineke).

21 februaro 2008

OKAZIS NIA jarkunveno, kiu estas kiel ĉiam ankaŭ normala klubkunveno. Tio signifas, ke ni multe babilis. Dum la libera diskutado ni parolis ekzemple pri la Universala Kongreso de 2008. Por la antaŭ- kaj postkongresoj oni serĉas ankoraŭ tradukantojn. La profesiaj ĉiĉeronoj parolas ne nian lingvon. Kiel envenintaĵon ni pritraktis demandon de kursano de Wil. Tiu kursano trovis la albumon *Eksenlime* de grupo *La Perdita Generacio*, kaj li volas scii kion signifas 'eksenlime'. Unu opinias ĝin instigo komenci sen limoj, alia rimarkigis, ke ni povas legi ĝin ankaŭ kiel eks-enlime. Finfine la respondo do estis, ke pri la nomo la kursano demandu grupon LPG mem.



Koos parolis pri radio. Li sendis *La Verdian Stelon* al Pola Radio, kiu la 12-an de februaro mallonge parolis pri nia informilo. Pola Radio ne elsendas plu per radio, sed ja estas ankoraŭ ĉiutaga elsendo en Interreto. Li krome informis nin, ke aperis nova podkasto de *Ondo de Esperanto*. Podkasto estas dosiero en Interreto, kiun oni povas elŝuti. Oni povas aŭskulti

ĝin per ajna mp3-aŭskultilo, ekzemple la *iPod* de la firmao *Apple*. Ligoj al ambaŭ troviĝas en niakluba retpaĝo pingveno.nl/klubo sub la rubriko *Ligiloj*.

Ne malgrave anonci estas, ke:

- la kotizo en 2009 ne ŝanĝiĝos, do restos po 12,50 EUR por membro.

- la Gratulservon transprenos *Gonda Kruyer*. Ni tre kore dankas al s-ino *Bets Dodebier*, kiu ĝin plenumis dum multaj jaroj.

- la kaskontrolkomisionon konsistigas *Frans Schild* kaj *Nelly Kiel*. Anstataŭanto estas *Koos Scharroo*. Dum multaj jaroj li ankaŭ ŝoforis. Pri tio ni nun ne petis lin ankoraŭ.

- la estraro denove ne ŝanĝiĝis.

La ceteron vi legos en la oficiala raporto pri la jarkunveno. (Johan)

LA ONDO DE ESPERANTO

6 marto 2008

WIL KUNPORTIS leteron de Marijke Lathouwers, kiu ne jam havas sufiĉajn helpantojn por la kongreso. Se vi volos helpi aŭ havas demandojn, bonvolu turni vin al s-ino *Lathouwers* aŭ *Van Ganswijk*.

Fondaĵo *Vrienden op de fiets* ebligas gastloĝi malmultekoste (maksimume po 16 EUR por nokto).

Koos ricevis per Interreto de hispana konato foton, kiu estis farita dum la antaŭa studosemajnfino. Ni parolis ankaŭ pri la sekva, kiu okazos en *Wijk-aan-Zee* en novembro 2008.

Wil rakontis pri familio *Reddingius*. Ili havas amikojn en Bulgarujo, kie la situacio estas malbona, precipe por maljunuloj. Familio *Reddingius* kolektis monon por amiko, por ke oni povu operacii lin en

Belgujo.

La temo de la vespero estas *ikonoj*.

Wil prelegos pri tiu temo kaj ŝi kunportis kelkajn ekzemplerojn.

La plej malnovan ikonon pentris la evangeliisto *Luko* (pri Maria kaj Kristo). La koloroj de ikonoj grekaj estas pli helaj ol tiuj de rusaj. Laŭ Nelly tio estas, ĉar en Grekujo la suno brilas pli hele.

En familioj oni havas kvar ikonojn: du ricevatajn pro la bapto kaj du okaze de la geedziĝa festo. Oni ofte ricevas pli kiel heredaĵon. Estas domaĝe, ke multaj ikonoj estis detruitaj en la jaro 600 p. K. Fine Wil cirkuligis kelkajn ekzemplerojn (verajn kaj bildojn de ili). (Gonda)



20 marto 2008

Wil iel sentis la foreston de kelkaj raporto en la lasta numero de nia informilo, sed kiam tiu jam estis eldonita, la lastaj anoncitaj kunvenoj estis ankoraŭ okazontaj. Oni do povos legi pri ili nur en la nova numero. Ŝi krome proponis enpresigi en la informilon la leteron de maljuna esperantisto el Bulgarujo, kiu raportas pri tiea malbona situacio. Ŝi ankaŭ kontaktiĝos kun *Wiebren* por sondi ĉu eblas akcepti lian proponon viziti lin en la unua de majo, ĉar ĝuste tiam ni ne kunvenos.

Ineke konstatis, ke pro la UK mendi ho-

telĉambron rekte, ekzemple interrete, do sen penado de UEA, oni pagos malpli da mono. Valoras do la peno almenaŭ klo-podi trovi mem tranokteblon.

En *Liberiĝ-tago*, la 5-a de majo, okazos de-nove foiro en la Urba Parko, kie 'Esperanto' verŝajne havos informbudon.

Ni preparolis la programon de la postso-mera periodo. Harm Roeters, kiu certas trovi temon, pretas prelegi. Ankaŭ Nelly povos ion rakonti, ĉar ŝi havos la bonŝan-con iri al Barato ĉeesti geedziĝan feston de sia edza kolego. Pri eventuala tiutema prelego ŝi decidus nur poste.

Regalis nin kaj la kunvenejo kaj Luit respektive per delikataj tortetoj kaj pom-kukaĵo, kiuj estis tre bongustaj akompa-naĵoj de la kafo.

Koos montris vizitkarton de Haarlem-a restoracio, kies nomon estas Esperanto. Li ricevis ĝin de kolegino, kiu scias, ke Esperanton li parolas kaj instruas. Vidante tiun restoracion, ŝi eniris ĝin por kontak-tiĝi kun la posedanto, kiu miris kaj ne konsciis, ke la lingvo estas instruata an-koraŭ. Ekzistas pli da entreprenoj havan-taj Esperantan nomon, ekzemple la vojaĝagentejo *Ferio*.



Ineke opinias, ke estus bona ideo viziti la partoprenantojn de la postkongreso en ilia restejo en Wolvega, kaj ŝi ankaŭ informiĝis, singarde sed esperplene, ĉu estas inter ni volontuloj, kiuj pretas gvidi eks-kurson dum tiu postkongreso. Bedaŭrin-de neniu trovas sin sufiĉe sperta, kaj eĉ la fakto, ke gvidantoj partoprenos senpage, ne helpis iun persvadi. Ŝi montris tolan sakon kun printita emblemo de la UK. La embleman bildon ŝi retroŝte sendis al la magazeno *HEMA*, kiu pretigas tiajn

aferojn. Ĝi certe estas bela memorigaĵo.

Harm vizitos kaj UK kaj IJK kaj intencas ekzameniĝi dumkongrese, pro kio ni deziras al li multan sukceson. Li kunportis la kartludon *Jungle Speed*, kiu ludeblas de kvar ĝis kvin personoj. En la komenco la reguloj ŝajnis iom malfacilaj, sed dum-lude ili plifaciliĝis, almenaŭ al kelkaj el ni. Plej grave estas reagi rapide al la laŭvice montritaj kartoj, de kiuj validas jen la kolo-ro jen la formo de la bildoj, depende de kartoj signantaj tiun alternadon. La reago konsistas en plej rapide forkapti, kiel unua, totemeton ĉizitan el ligno, kaj pre-fereble tiel sen knokaŭti la kunludantojn, kio vere ja estas menciita en la ludoregu-loj!



Wil ludigis nin per kartoj provizitaj respektive per demandoj kaj respondoj. Laŭvice oni prenu karton, starigu la de-mandon al respondonto antaŭe elektita, kiu siavice reagu laŭ la respondokarto, kio ofte ridigis. Ekzemple *Ĉu vi saltus en malvarmegan akvon por min savi?* Kaj la respondo: *Mi donos al vi la respondon skri-be.*

La kunvenindiko de la 3-a de aprilo erare elfalis el la informila programo. Ni tamen preparolos la temon *Proverboj*.

★ SPA ★

Pasko en Pollando

Mi bone memoras mian unuan Paskon en Belgujo, ĉar ĝi tute diferencis de tiu en mia lando (Pollando). En vendejoj kaj ĉe ĉiuj parencoj kaj gamikoj okulfrapis min *a-maso* da ĉokoladaj ovoĵoj: blankaj, nigraj, envolvitaj en brilantaj koloraj paperetoj... Fojfoje videblis eĉ ĉokolada leporo.


Dum belga Pasko-dimanĉo ĉiu infano, kun korbeto enmane, devas serĉi la ĉokoladajn ovoĵojn kaŝitajn en la ĝardeno fare de la geavoj aŭ gepatroj. Granda travivaĵo kaj ekscito! Post la ovkolektado oni ĵetas la trovitan dolĉan trezoron surgrunden aŭ surplanken, depende de la vetero, kaj juste, laŭeble, dividas la ĉokoladan ovaron inter la ovserĉintaj infanoj.

Sed de kie venas tiuj ĉokoladaj ovoĵoj? demandas la etuloj. La gepatroj kaj geavoj havas tuj pretan respondon (cetere por mi tute absurda): la sonoriloj, revenintaj el Romo, faligas nokte la ovoĵojn en ĉies ĝardenojn.



Kiam la infanoj fariĝas pli aĝaj, ili demandas la gepatrojn, kial ili ĉiam mensogis. Evidentiĝas, ke ankaŭ Sankta Nikolao ne ekzistas, ke la paskajn ovoĵojn kaŝas la gepatroj aŭ geavoj mem. Iun tagon mi aŭdis infanon demandi *kaj Jesuo, ĉu ankaŭ li ne ekzistis?*

En Pollando tiuj paskaj kutimoj tute ne estas konataj. Mi memoras tre bone la antaŭpaskajn lecionojn en la elementa lernejo, dum kiuj ni ornamis malplenajn ovoĵojn (malplenigi ilin hejme ne ĉiam facilis!) La ornamitaj paskaj ovoĵoj nomiĝas en la pola *pisanki*.



Ekzistas diversaj teknikoj ornamu ilin. Ni aplikis la plej simplan metodon, nome surgluadis diverskolorajn trikfadenojn aŭ figuretojn eltonditajn el koloraj paperoj. Ni ankaŭ kolorigis la ovoĵojn per diversgrandaj penikoj.

Mi scias, ke en multaj hejmoj dommastroj pro tempomanko ofte kolorigis la paskajn ovoĵojn kuirante ilin en la akvo kun cepoŝeloj por atingi hel- aŭ malhelbrunan rezulton.

Mi legis, ke ekzistas ankoraŭ pli 'seriozaj' ornamteknikoj de la paskaj ovoĵoj, ekzemple la tiel nomata *gladila sistemo*. Per iu

ŝtala miniature funelo¹ oni surmetas varman vakson sur la ovon. Poste oni metas la vaksitan ovon en la dekoktaĵon² faritan el kverk- alno-³, nukso-, cepo- aŭ betoŝeloj, cerealo, ruĝaj papavofloroj por akiri la deziratan koloron. *Kraszanki* [kraŝanki] estas alia nomo de la ornamitaj paskaj ovoj, kiujn oni ornamas per alia tekniko: gravurado. Tiun teknikon oni aplikis en Silezio. Eble menciindas, ke en Silezio oni



eĉ ludis per *pisanki/kraszanki*. La plej konata ludeto estis ĵeti la ovojn en truon. Sankta Vendredo antaŭ Pasko estis tradicie granda kuirtago por ĉiuj dommastriroj. Tiam oni bakis paskajn gistokukojn, kuiris aŭ fumajis ŝinkojn, kolbasojn kaj preparis multajn aliajn paskajn specialaĵojn. Certe ne mankis diversspecaj paskaj kukoj, ekzemple *babka wielkanocna* [vjelkanocna] kaj *mazurki* [mazurki]. Kompreneble oni ne forgesis pri la paskaj ovoj amase kuiritaj (malmolaj) kaj poste

- 1 ilo, kies supra parto estas konusforma kaj kiu finiĝas malsupre per rekta tubo, uzata por verŝi likvon en botelon, vazon ks.
- 2 solvaĵo ricevita per longa kuirado de vegetaĵoj en akvo
- 3 arbo el betulacoj, kun amentoj

bele ornamitaj aŭ diversmaniere preparitaj por manĝi.

Nuntempe, ĉefe en urboj, oni kuiras multe malpli, ĉar multaj manĝaĵoj facile aĉeteblas, sed mi ja scias, ke en multaj polaj vilaĝoj oni festas Paskon ankaŭ nun tre tradicie. En kelkaj regionoj oni organizas en tiu tago grandajn spektaklojn (*kalvariojn*), kiuj prezentas la sufervojon de Jesuo.

La plej famaj *kalvarioj* okazas en la urbejoj: *Kalwaria Zebrzydowska*, *Niepokalanów* kaj *Górka Klasztorna* [kalvarjabezĵidovska, ĵnepokalanuf, gurka klaŝtorna].

Por mi, kiel infano, la plej amuza estis sabato antaŭ Pasko, ĉar tiam ni devis pleniĝi la paskokorbeton per kelkaj manĝaĵoj (en simbolaj kvantoj) kaj bele ornamigi ĝin per diversspecaj branĉetoj, miniaturaj lud-ŝafetoj kaj kokidoj. La kutima korboenhavo konsistis el malmole kuiritaj kaj bele ornamitaj ovo, kuirita ŝinko kaj/aŭ blanka kolbaso, fromaĝo, paska kuko, pano, kreno kaj salo. Ĉiu produkto (7) havas simolan signifon, ekzemple ovo estas simbolo de nova vivo, naskiĝo, reviviĝo; viandaĵo simbolas bonfarton, riĉecon, fekundon; kreno – psikan kaj fi-

zikan forton; salo – vivon, ekziston; pano – la korpon de Jesuo Kristo.

La korbo-enhavo iom diferencas en diversaj regionoj. Kun tia paska korbeto (plejofte el kunplektitaj vergetoj salikaj, sed foje pajlaj) ni, la infanoj, iris al la proksima preĝejo, kie la pastro aspergis⁴ ĉiujn paskajn korbetojn sur speciale tiucele aranĝita tablego. Foje la pastro ne estis tro ŝparema je 'aspergakvo' kaj per sia granda aspergilo malsekigis multajn, kiuj staris ĉirkaŭ la tablego. La infanoj tre ŝatis kaj eĉ atendis tion, sed ja, ne ĉiufoje la pastro estis bonhumora. La unua demando de la gepatroj hejme estis: *Ĉu ankaŭ vi estas aspergita?*

Imagu la frustriĝon post la hejmvreveno... ni ne povis tuŝi la korbojn! Ni devis atendi ĝis la dimanĉmateno. Ne ĉiam ni sukcesis elteni ĝis la Granda Nokto⁵ por aŭdi la petard-eksplozadon⁶, faritan omaĝe al la reviviĝinta Jesuo Kristo. Noktomeze oni celebras la meson, kiu nomiĝas *resurekto*, (reviviĝo) kaj ĝi ofte finiĝas per granda bruoj.



4 aspergi iun/ion: ŝprucigi likvon por sanktigi (aŭ malsekigi)

5 *Wielkanoc* [vjelkanoc] signifas en la pola Granda Nokto

6 petardo: malforta eksplodilo, konsistanta el pulvo, entenata en kartona tubo kaj uzata kiel signalo aŭ amuzaĵo

La dimanĉa paska matenmanĝo komenciĝis per simbola gustumado de la korba enhavo. Samtempe oni diziris unu al aliaj serenon Paskon.

Poste la tutan tagon oni 'gustumis' (komprenu: manĝegis!) ĉiujn paskajn specialaĵojn. Mi ofte demandis min, kial ni devas tiom longe sidi ĉetabla kaj tiom multe manĝi. En mia memoro restas ĝis nun plenaj tabloj, plenaj fridujoj kaj... ja oni devis manĝi la paskajn restaĵojn dum pluraj sekvaj tagoj! (kiel kristnaske, sed kun aliaj specialaĵoj!)

Malseka lundo nomata *Śmigus Dyngus*⁷ [smigus dingus] estis la plej amuza tago de paska periodo (aŭ la plej terura, depende kiel oni interpretas ĝin).



Oni simple malsekigas unu la aliajn. En vilaĝoj la akvokvanto serioze diferencas de tiu en urboj, ekzemple vilaĝaninoj estas malsekigataj fare de kuraĝaj kaj fortaj vilaĝanoj per akvo el siteloj (fojfoje per ĝardena aspergotubo) kaj urbaninoj per akvo el plastaj ovetoj. Ĉe ni hejme ni simbole malsekigas unu la alian per parfumoj (iam ja per akvo!) Mi memoras tiun tagon tre bone, ĉar mi ĉiam timis iri eksteren.

Iwona Kocięba, polino, loĝanta jam delonge en Belgujo. Fonto: Edukado.net

7 *Śmigus Dyngus* (aŭ mallonge *Dyngus*): malseka paska lundo

En sia elsendo de la 12-a de februaro Pola Radio parolis pri nia gazeto.
Jen la teksto:



Hodiaŭ la unuan fojon ni havas la okazon paroli pri *La Verda Stelo*, la gazeto de Esperanto Noord-Nederland, kiu logas la leganton per sia zorge pripensita ekstera aspekto – hela, klare displanita enhave, kun plaĉaj grafikaj ornamoj, alloga fotobildo pri iu arbotrunka surkreskaĵo, ebligante konjekti, ke inter la membroj de pli ol 80-jaraj sekcio Groningen-Drente kaj Frisa Esperantista Rondo multas naturamantoj.

Tiaj aspektoj tute ne estas negravaj, se temas pri la emo enrigardi la enhavon. Aparte se ili akompanas raportojn pri eksterlandaj vizitoj. Ĉi-numere temas pri Komoraj Insuloj kaj Tajvano, ankaŭ vizito en Nederlando. Kompreneble la revuo riĉe spegulas interesajn lokajn aktivadojn kaj aperinte en decembro rerigardas al la novembra Malferma Tago, jam anoncante la plej proksiman, dediĉitan al la 100-jariĝo de UEA-fondo la 26-an de aprilo. Koran dankon al la nordnederlanda klubo pro la eblo konatiĝi kun tiu interesa periodaĵo.

de maljuna bulgara
samideano

Jam 18 jarojn post la politikaj ŝanĝoj en nia lando, anstataŭ la atendita plibonigo de nia vivmaniero, la kondiĉoj de nia vivo ĉiam pli kaj pli malboniĝas kaj ni ĉiam pli kaj pli enpaŝas en la marĉon de mizero. Kaj ĉar la registaro nenion faras por la plibonigo de nia vivmaniero, ni, la loĝantoj el diversaj profesioj, komencis protesti kontraŭ la politiko de la administrantoj.

Unue strikis la ministroj, kiuj volis plialtigon de la salajroj. La administrado trankviligis ilin, plenumis iliajn postulojn. Poste komenciĝis la striko de la aŭtobusaj kaj tramaj ŝoforoj. Estis plenumitaj ankaŭ iliaj postuloj. Samtempe komenciĝis niaj protestoj, do de la pensiuloj, kiuj daŭris 9 monatojn. Ĉiun ĵaŭdon, je la 11-a horo antaŭtagmeze, ni, el ĉiuj pli grandaj urboj, manifestaciis sur la stratoj kun la postulo por plialtigo de la dimensio de niaj pensioj kaj kontraŭ la efektivigita genocido de la pensiuloj fare de la administraro. Ĉar oni ne povas vivi per monata pensio de 70-80 eŭroj, kiu estas la pensio de la pli granda parto de ni.

De la 1-a de oktobro, kiel rezulto de niaj protestoj, la registaro plialtigis niajn pensiojn per 10%, per kiuj oni povas aĉeti nur 15 panojn aŭ eltrinki 15 tasetojn da kafo. Vera moko al ni, la homoj maljunaj kaj malsanaj, kies bezonoj de nutraĵo, medikamentoj kaj hejtado ne povas esti kontentigitaj per ĉi tiu sensignifa plialtigo.

La lernojaroj en Bulgarujo komenciĝas la 15-an de septembro. Post ties malfermo la instruistoj el la tuta lando ne revenis en la lernejarajn ĉambrojn. Ili komencis strikon, kiu daŭris 6 semajnojn. La lernejoj estis fermitaj kaj la lernantoj vagis sur la stratoj. La instruistoj manifestaciis por plialtigo de la salajroj, kiuj ne superas 180-200 eŭrojn. Post longaj intertraktadoj kun la instruista sindikato la registaro plialtigis la instruistajn salajrojn per 20% kaj promesis doni monon por la plibonigo kaj modernigo de la instrua procedo.

Strikis kaj la kuracistoj, per manifestacioj, kun la postulo pri pli da mono por pligrandigo de la salajroj, kiuj estas inter 170 kaj 250 eŭroj, kaj por plibonigo de la kondiĉoj por kuracado en la hospitaloj. Iliaj postuloj estis trankviligitaj per promesoj. Protestis scienculoj, kies salajroj estas kiel tiuj de la kuracistoj. Protestas ankaŭ la flegistinoj. Ankaŭ ili volas pli grandajn salajrojn. Ĉiuj protestas, ĉar per la ricevitaj salajroj oni povas nek vivteni sin kaj siajn familianojn, nek plialtigi sian kvalifikon.

Pro grandaj senigoj ni apenaŭ sukcesas nin savi.



Een Esperantoproeflesje

*“Tago” is dag en “pano” is brood,
“Vivo” is leven en “morto” is dood.
“La” is het lidwoord voor ieder geslacht;
“Vespero” is avond en “nokto” is nacht.
“Labori” is werken en “manĝi” is eten,
“Koni” is kennen en “scii” is weten.
“Ruĝa” is rood en “nigra” is zwart;
“Amo” is liefde en “koro” het hart.
“Nazo” is neus en “buŝo” is mond,
“Bona” is goed en “sana” gezond.
“Fari” is doen, “forgesi” vergeten,
“Pensi” is denken, “mezuri” is meten.
“Paroli” is spreken, “silenti” is zwijgen,
“Ĉasi” is jagen, “spiregi” is hijgen.
“Kuri” is lopen en “flugi” is vliegen,
“Vero” is waarheid, “mensogi” is liegen.
“Povi” is kunnen en “voli” is willen,
“Flustri” is fluisteren, “kriegi” is gillen.
“Longa” is lang en “granda” is groot,
“Riĉo” is rijkdom, “mizero” is nood.
“Saluti” is groeten en “homoj” zijn menschen,
“Libero” is vrijheid, “deziroj” zijn wenschen.
In een oogwenk een veertig woorden te leeren,
Dat moet U in een and're taal eens probeeren!
Dus d' eenvoud van ESPERANTO - ge kent haar nu -
Deze taal verder te leeren staat nu aan U!*



“De Automaat” 1935

M.J. Blok

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen